

PENSEO

N-ro 272

jun. / 2014

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 25-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



metempsikozo

ĉio estas teda;
ni kreu neniecon por adori.
neniu vidas nenion;
por la mortinta koro, tiu iĝos freŝa ĉio.



gardisto sonĝanta

havante tro da kugloj, kontraŭ la ĉielon mi
pafadas
por saluti tagojn karmemorajn.
iama virga tero estis jam plugita de
migrinto.
antaŭ graseta la ĝardeno mi ja estas
gardisto sonĝanta.

progreso

antaŭe ni naĝis en jako.
tridekjara mi ankoraŭ prenis geamoron
por ludo de fiŝoj.



nun oni povas kuŝi en la seĝoj nudaj en
ĝardeno

kaj la ĉielon fiki imagante nuboflokojn
koral-piĉoj.

Klono

eltirinte blankan haron el sub la etkapo,
mi enterigis tiun ĉe la roĝo ovotempa.
kuŝante inter tomboj sur la nuba drapo,
mi atendas ke elkresku tie mi printempa.

Nazaré Laroca (Brazilo)



Ŝanĝoj

Dum kelkaj horoj
etan apartamenton
ni malmuntas.

Ni ĉion enpakas:
revojn, dolorojn
kaj momentojn
el rido kaj ĉagreno.

Ŝanĝoj estas
la fadenoj
de l' teksaĵo
de l' vivo.

Sed, survoje al steloj,
jen nia defio:
malnodi
la blindajn kelojn

en ni mem.

San-Paŭlo, 16/03/2014.



Volonte ĉe l' metropol'
esti gvidata mi permesas
de San-Paŭlo, kies
devizo kun fier' ekkrias:
"Mi ne kondukatas,
kondukas mi."

Urbego de mil unu
multaj vizaĝoj,
ke nin eĉ ne mirigas
la kvieteco de ĉi strato,
kie vivas arboj
kaj afablaj homoj.

Do mi tuj ekamikiĝas,
per diskrete amikeco,
kun Suno, la hundeto.

Mielkolora hararo,
mildnaiva rigardo,
kaj leksaluto
antaŭ ol ekdormi
tiel neatendite,
sen peti permeson.

Kaj li songas pri ombr' nun
En korto, inter bananujoj,
de ia domet' ĉe montar'
de l' ŝtato Minas-Ĵerajs'.

Juiz de Fora, 17/03/2014.

Mori (Usono)



Iu demandis min ;
Ĉu vi estas poeto?
Mi respondis , ne, tute ne,
mi nur estas idioto
kiu laŭte pensas!

Ŝafoj

kokinoj forkuras de vulpoj
ŝafoj forkuras de lupoj
kaj mi forkuras de ŝafoj
ŝafoj, ŝafoj, ŝafoj
ŝafoj forpelis min el mia hejmo
ŝafoj ruinigis mian vivon
ŝafoj, ŝafoj ŝafoj
ŝafoj silentaj
ŝafoj indiferentaj
ŝafoj lakeaj
ŝafoj sklavemaj
ŝafoj egoistaj
ŝafoj fanatikaj
ŝafoj senpensaj
ŝafoj senkarakteraj
ŝafoj senprincipaj
ŝafoj senmoralaj
ŝafoj senkoraj
ŝafoj timemaj
ŝafoj idiotaj
ŝafoj patriotaj
kiuj surtronigas tiranon
kaj subpremas civitanojn,...
ŝafoj, ŝafoj ŝafoj
mi forkuras de ŝafoj ...



Petro Palivoda (Ukrainio)



Feliço

Estas malvarme,
varme
varmege
kaj ree malvarme.
Mi serças feliçon.
Mi malvarmumis.

kiel ekscius mi
ke tago estas tago
se mi nokton ne konus
kiel ekscius mi
ke rido estas rido
se mi ne sopiradus

tagiĝas
kaj mi ridetas

vi estas ploro
se mi ploras
vi estas rido
se mi ridas
vi estas morto
se mi mortas
vi estas vivo
se mi vivas

vi estas ploro
vi estas rido
vi estas morto
vi estas vivo


mi ploras
mi ridas
mi mortas
mi vivas

nuboj kovradas
stelojn

neĝo kovradas
florojn
nenien mi iros
hodiaŭ



Paŭlo Silas (Brazilo)



AMA VARMO

Ĉiuj naskiĝas por am'
Kaj por esti kune ĝis odoras la balzam'.
Frue aŭ iam kor' vibros.
Vi komprenos kiam la bezono vin travipos.
Se dekomence vi neas,
Poste, tute certe, la certeco ekpaneas.
Iuj kapablas neadi
Dum interne flam' neestingebla sentas ardi.
Viv' enhavriĉa vin havos,
Se vi mole cedos al am', kiu ĉiam pravos.
Jes! Vin ĉirkaŭos la viv'.
Nur ne plendu pri mank' de racia vivsignif'.
Am' ne racie funkcias:
Subjektive floras, florsimile plu gracias.

Timo, singardo kaj zorgoj.
Vort' aluda, flirto parolema, amprovokoj.
Pensi, mediti kaj pesi.
Kaj reveni, revi, rekunigi, sin forgesi.
Lasi, ne zorgi, ignori.
Apudesti, stari kaj atenti, rememori.
Ordo, reguloj, normalo.
Ĉiutagaj devoj, sindevigoj, tempoŝparo.
Vidi distancon, rezigni.
Ĉu grandpaŝe kuri trans kaj limojn ne plu
signi?
Multon promesi, plenumi.
Kion? Kion volas vi? Ĉu volas nur seksumi?
Do, man-etendo instiga.

Etpermesi supreniran kison plej amikan.
Iĝi unuo per karno.
Per naturo lasi elmontriĝi ama varmo.



Vitoresperanto (Brazilo)




La Sun-renaskiĝo

(kantteksto)

En ridad' estu tiel la vivo mia
Pro plorad' junulec' estis iluzia

Post la ŝtormo-ir'
Jen Sun-renaskiĝ',
Post ĉi resopir'
Estos iu por am-renoviĝ'.

En ridad' estu tiel la vivo mia,
Pro plorad' junulec' estis iluzia.



Fher González



Vivi sen aero

Jen la esperanta traduko de la kanto "Vivir sin aire"
de la grupo Maná.

Kiel mi volus ja vivi sen aero...
Kiel mi volus ja vivi eĉ sen akvo...
Mi ŝatus vere ja vin adori malpli.
Kiel mi volus ne plu bezoni vin.
Sed mi ne povas, mi senkonsolas,
mi sufokiĝas nun sen vi.
Kiel mi volus ja vivi sen aero.
Kiel mi volus l' afliktojn peli for.
Kiel mi volus ja vivi eĉ sen akvo.
Mi ŝatus vere min senti via kor'.
Kiel do povus sen akvo naĝi fiŝo?
Kiel do povus sen tero kreski floro?
Kiel mi volus ne plu bezoni vin. Ho ne!
Sed mi ne povas, mi senkonsolas,
mi sufokiĝas nun sen vi.
Kiel mi volus ja vivi sen aero.
Kiel mi volus l' afliktojn peli for.
Kiel mi volus ja vivi eĉ sen akvo.
Mi ŝatus vere min senti via kor'.

Kiel mi volus vin meti en forgeson.
Kiel mi volus vin gardi en skatol'.
Kiel mi volus forviŝi vin el menso.
Mi ŝatus vere ĉi kanton ĵeti for.

Tradukis



Svena Dun (Hispanio)

Ewa Lipska (1945-)



INFANDOMO

Tridek paroj da feltaj pantofletoj
kun tulip-floro brodita en mezo
Tridek supervestoj makulitaj per suko
el nigra ribo. Tridek katoj senmovaj
broditaj per plata kudrero.
Tridek paroj da etmanoj etenditaj
nur por preni kuleron por manĝi la supon.
Tridek paroj da okuloj dum song' malfermataj
por ekvidi la gepatrojn sur bombon-montetoj.

Se mia panjo volus,
 povus esti reĝino.
 Sed ŝi devis morti
 ĉar paĉjo ŝanĝiĝis en lupon.
 Mia panjo estis maldika,
 pro tio ne povis min ami.
 Sed kiam ŝi estos iom pli dika,
 tiam aĉetos min por ĉiam.
 Mia panjo estas belega, Mia paĉjo estas forta.
 Mia panjo estas riĉa. Ŝi povus aĉeti
 Nordan Amerikon kaj oron. Kaj la paĉjo
 kapablas pafi el vera karabeno.

Tridek paroj da piedetoj
 staras antaŭ fermita trako
 kaj atendas la alvenon
 de la hejmo.



Esperantigis



Helena Tylipska (Italujo)

Marco Masini (1964-)



Kion vi pensas

(kantteksto)

Sola enfermita en ĉambro
 iranta la animo tien kaj reen
 vi jam perdis la esperon
 kaj ni ne parolas plu
 kaj vin hontigas elŝovi,
 vian venenon ankaŭ kun mi
 kaj ĉiutage vi mortas

kaj tiam mi mortas kiel vi.
 Kiom bravulaĉo timigante
 atakas vin kaj la malfortikeco
 vivas ĝin kiel fiaskon,
 kiu protektos vin?
 La pasintaj tagoj kaj ŝancoj
 revoj perditaj survoje
 vian taglibron seniluziigojn
 abismoj de melankolio.
 Via malĝojo estas senvoĉa
 erara same kiel la mia
 vi ĉirkaŭfermiĝas kiel juglando
 per la timo antaŭ viaj enmensaj
 malplenoj...



Kion vi pensas sen mi ?
 Kion vi opinias, kio estas ?
 Mi dezirus ke vi traktus min malbone
 ke vi ĵetos vin sur mi
 per furio de bestoj
 por forigi vin de vi mem
 kaj ne vidi ke vi cedas
 vi volas ĵeti vin for(malproksimiĝi vin)
 kaj ĉi mallumo ne deturniĝadis
 kaj vi senvoĉas animo mia !
 Sola kun via vundo
 sur kiom da libroj vi serĉos
 por ludi la ludon de la vivo
 kiu oni neniam lernos.
 ĉar vi ne aŭskultas mian voĉon
 via doloro estas same kiel la mia
 mi ŝatus rompi tiun juglandon
 kaj liberigi vin de viaj inmensaj
 malplenoj...
 kion vi pensas sen mi ?
 kion vi opinias, kio estas tio?
 kion vi pensas sen mi ?
 kion vi opinias, kio estas tio ?

ankaŭ mi dezirus scii,
pri kion vi pensas, pri kio, amo mia...


Esperantigis



Leieladonna (Meksikio)



Rabindranath TAGORE (1864-1941)



KANTO DE L'MALVENKO

Min ordonis Mastro, dum rande de l'vojo
sidas mi, kanti kanton de l'Malvenko, ĉar la
fianĉinon estas tiu ĉi, kiun Li kaŝe
amindumas.

Nigran vualon surmetis ŝi por l'vizaĝon kaŝi je
l'popolamas', sed juvel' sur la brust' en nokto
briladas.

De l'tago ŝi forlasitas, sed nokto de Dio ŝin
atendas, kun ĝiaj lumigitaj lampoj kaj
rosoperlunitaj floroj.

Silentas ŝi, kaj malsuprenokulas ; domon sian
ŝi forlasis malantaŭ sin, kaj el tiu domo eliĝis
sur vento veo.

Sed ĉiuj steloj kantas kanton de amo eterna al
tiu milda vizaĝ' je honto kaj sufer' plena.

Malfermitas la pordo al la soleca ĉambro ;
sonoris la alvoko, kaj koro de l'nokto tremegis
per soleno, pro l'venonta aflikto.

** Li estis viŝnuisma hinduo, sed tiu ĉi poemo aromas
je kristecaj valoroj.*

el : Fruktokorbo poemo n° 85

esperantigis



R. Platteau (Francujo)

Shefqete GOSALCI


La spegulo

La nova jarcento malhela
Gardas sur la kastelo
La arbidon el la jaro 1878
Kreitaĵojn kaŝe grasiĝintajn
Sub la dua radiko de la formulo 1244

Formanĝas ili la cerboparton
Restinta en Prizren kaj Prishtina
Tirana pliriĉigas la menuon
— de mallaŭdoj al si mem
Mitrovica ŝirita melodio
Ĉamerio tiu larmero
Sicilio falinta lulilpiedo

La diabloj eligis disde la mamu la bebojn
Rompis ili la Arbroran spegulon
Kvazaŭ ŝirita koloro de la ĉielarko
Ŝkupi kun Migjena tuso
— mordas ĝiskarne la ungojn

Kaj Zara ludas per malnova gitaro
Skribas poeziojn por si mem
— kaj pri la truita boato



Tivari skuas la mantelon
— pro la nebuloj ŝimita
Printempo tranĉita Junion
Kaj Vieno grizhara operacias
— malnovan mapon

Poste kaŝe sin vidas sur la spegulo
Post la plasta vizaĝa operacio

Mankas la trafiklumo por la pacienco

Balkanio korpemas sian anĝelon

La svelita mensogaĵo lulas

— la osthautan negacion

Atentu — ne subskribu la sorton

Per maniloj

La vundomordo

Mi petis Kosovo multfoje

Por ke mi kisu vian ardigitan vangon

Por ke mi viŝu almenaŭ larmeron

Mi sonĝis vin kun ornamaĵoj

Novedzinon en Ĉamerio

Demandis mi viajn manojn, la maldekstran vi
donis

Ĉar la dekstran kaj la fingron vi scias kie ja
estas

Kaj la ĉielarkajn okulojn en la sonĝoj vi vidas

Mi volis kisi vin Patrio, sed vi ne lasis

Sed tempon ne tiam, nek hodiaŭ vi havis

Surmeti la kapon en vian bruston mi deziris

Ne, respondis vi — ardiĝas

Kiun parton de via NE mi ne komprenas

En la silenta areno nur mi

Kaj vi Kosovo

Ne interkisitaj plurestas

Inter ni la flago kaj vundon

Mi volas kisi vian brilan frunton

Ĉe la luno mi embuskas

Naski por vi knabon mi volas

Sed same vi respondas

La jarojn vi dekorigis per atendo

Kaj versvico kun vi

Mi ne konsentas Kosovo, ne plu estas la jaro

81

Mi Solomonon ne obeos

Rozafu, ruĝiĝinta fendlipo mi fariĝos

Mia mordigita amo kaj vundo

Mia lulilo, plenbuŝo kaj fingroringo trempita
en suno

Pasu Kosovo sur min

Malsekigu la lipojn sur akvumitan muron
mian

Esperantigis



Bardhyl Selimi (Albanio)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbio)



Amikeco

— laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Mi tostu

al amikeco!

Fortiĝas ĝi pli kaj pli.

Je via bonintenco

kaj sincereco!

Retado

en virtuala

amika rondo bela,

kiel lulil' fabela.

En mond' kruela.

Interret'.

Mi ĵetas min kore.

Retumado intensa.

Laboru ni brilore

venku aŭrore!

Sincere,

kredo inter ni

iĝas amikeco ĉi

tre senbarila por ni .
Vivu harmoni'!

Memoru,
amikecon ni
ĉerpis el ĉiutagaj'
kaj el retmesaĝo ĉi
"kunlaboru ni!"



Malbona sorto

— laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Jen, kokin'
bela grandkresta
klukanta en sia kort'.
La kuŝejo birdnesta
sen kok' foresta.

Hieno
pigra, malsata
ekvidis la kokinon
elfore. Mi malsata
ĝi jam kovata.

Deserto—
bonegaj ovoĵ.
Kokidaĵon por ventro
plena. Kun miaj povoj
al bonaj trovoj!

Hieno
ridis ĝojplena.
Dume tra herbej' siblis
la serpento venena
kun plan' serena.

Subita

tondro fulmoporta
krakadis surĉiele.
Fuĝis la bestokorta.
Jen, hien' morta.

Sovaĝa kaj hejma azeno

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Perdiĝis
foje azeno.
Vagadis ĝi tre longe
antaŭ ĝia alveno
sur ĉi bieno.

Ho, azen'.
Similas al mi .
Tamen ĝi vivas riĉe .
Kia vileco al ĝi
sed trograseco!

Libero
feliĉo via!
Sovaĝejo allogas.
Ĉe vi zorgo nenia
nur, bleko ia.

Miskompren'.
Kial plend' ĝia?
Mankas pli da dankemo?
Kial malĝojo tia
en rigard' ĝia?

Nova tag'.
Azen' ŝarĝita .
Per bastono pelata,
sub ŝarĝo kurbiĝita.
Forte batita.!



*Moral instruo: ne ekzistas feliĉo konstruita sur
turmentado kaj humiligado !*

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfoma
poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo
xa,xa,a (x=senrima).*

Vejdo (Ĉinujo)



Vagabonda hundo

—laŭ ĉinesko Huanxisha*

1.

sencele vagadas hund'
ĉu pro zorga malabund'
aŭ mastra batada rund'

mizere ĝi surstrate
evitas homojn kun grunt'
pro videbla krura vund'

2.

kie 'stas ĝia azil'
por ĝia viva facil'
kaj sane farta trankvil'

abomeninda mastro
ĉu li kun kora malbril'
pentas pri virta steril'



2014-01-21

**Huanxisha (Silk-lava rojo): ĉina fiksfoma poemo el
du strofoj kun po tri versoj de sep silaboj laŭ
rimaranĝo aaa / xaa (x=senrima)*

Catherine B. Krause (Usono)



La servanto

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

ni
sub la supra energi'
ne scias
pri ekvilibri':

reĝ'
travivinta de la neĝ'
ne nepre
sidados en seĝ'

dum
stultulo kun oportun'
subite
mergiĝos el lum'

por
tranĉi kapon el la flor'
kreskinta
en komenca hor'.

Lily (Ĉinujo)

Embarasaĵo en avio

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

En
avi' kun brila seren'
mi kaj li
babilis sen ĝen'.

Du
novkonatoj jam en ĝu'
flirtadis
sen fluga enu'

Li
fole atakis min pli
permane
kun tikla mani'.

Eĉ
li palpis tra l' jupo-breĉ'
jam pubon

mian kun spir-streĉ’.

Jes
ankaŭ mi kun interes’
tordiĝis
sub lia agres’.


Sur
lian sinon kun murmur’
li lokis
min por aventur’.

Jam
mi brulis ja per seks-flam’
en korpo
por portempa am’.

Mi
sentis kac-duron de li
jam pretan
por tuja funkci’.

Per
mano li kun maltener’
senigis
min je mov-liber’.

Je
ektir’ mia kalsonet’
defalis
sen ajna pane’.



Sen
bru’ li enŝovis sen pen’
la kacon
en min por festen’.

Nur
kac-kirliĝoj de plezur’

kondukis
al ŝprucad’ de ĉur’.

Ne
ĝemkriet’ ĉe apoge’
aŭdiĝis
ĉar, absurde, ve!

**Dekses-Silabo (ĉine: Shiliuziling): ĉina fikforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Anna Maŝarova (Rusio)

En bazaro

Viktoria staris ĉe vendotablo, care rektiginte dorson, alte levinte kapon, kaj senvoĉe persvadis aĉetantojn ne aliri al sia vendotablo. Ĉizitaj kuiraj tabuloj kaj alia ligna kuirilaro, kiun ŝia edzo faris, ĉiam havis aĉetemon, sed hodiaŭ ŝi ne bezonis aĉetantojn. Majesta staturo de Viktoria estis nevola – malgraŭ malvarmo ŝi staris senmove, timante eĉ moveti sin. Ĉiu movo ekscitis doloron.

Doloro pulsas en tempioj, gratis gorgon, turnis artikojn. Eĉ malgranda turno de kapo ekscitis naŭzon, tial Viktoria parolis kvazaŭ trofiere, mallonge kaj nur nemulte fiksante rigardon, fortimigante aĉetantojn pro nevola tromemfido.

Viktoria matene ne venis al hejmo por ŝanĝi sian veston, kaj nun dum frosto insultis sin per malbonaj vortoj – punta, kun granda dekoltaĵo, robo estis ĝustaloka hieraŭ en loĝejo de gastigantoj, sed hodiaŭ la robo absolute ne varmigis. Ŝajnis, ke ne helpas vatitaj pantalonoj, dika trikita bluzo sub pelto. Al vespero frostego venis, piedoj perdis senseblecon, ne helpis eĉ ĉifita ŝovita en feltbotojn ĵurnalo, en nazo pikis glaciigintaj haretoj, frosto pinĉis vangojn, okulharoj kungluiĝis pro malvarmo, larmoj fluus seninterrompe tuj hardiĝante kiel malbonaj brilaj kristaloj. Ŝi volis pli baldaŭ fini laboron, trinki varmegan teon kaj fali en bankuvo.

Viktoria antaŭĝuis, kiel ŝi malfermos kranon kun varmega akvo, aldonos aroman salon, elverŝos duonon da flakono de multekosta ŝaŭmo, aldonos aliajn interesajn aĵojn. Ŝi jam aŭdis kareseman flustron de krevantaj sapaj vezikoj, sentis nemulte maldolĉetan absintan aromon, antaŭĝuis, kiel etendos lacajn gambojn, fleksos malantaŭen kapon, kaj varmega akvo komencos karesi ŝian frostitan korpon. Kaj ŝi estos senpense kuŝanta en bankuvo aŭskultante ian facilan muzikon kaj varmigis sin, varmigis sin, varmigis sin...

Hieraŭa amikvespero estis bonega, estis gaje kaj laŭte, oni festis preskaŭ ĝis mateno, kaj nun tiu gajeco influis per frapado la tempiojn, per naŭzo kaj doloro la tutan korpon. Certe oni drinkis multan alkoholaĵon, sed Viktoria neniam suferis pro postebrieco. Ŝi supozis, ke kialo de sia nuna farto estis malbona alkoholaĵo. Plej probable gastigantino aĉetis ne kvalitan vodkon, kaj nun ŝi, Viktoria, devas suferi pro aliula avareco.

– Viktoria! Kial vi estas tia? – najbarino demandis demaldekstre mirita pro neordinara silento de la amikino. – Ĉu vi malsaniĝis?

– Jes, kapo tre doloras! Hieraŭ ĉe amikino Nina mi verŝajne venenis sin.

Maljunulino, kiu kontraŭe vendis ikonojn kaj kandelojn, rikaneme diris:

– Oni devas pli malmulte drinki, jen kaj oni ne venenos sin. Sed oni mem drinkas ĝis malapero de pulso kaj poste serĉas kulpulojn.

Viktoria silente ekrigardis la maljunulinon, senvorte sendante ŝin al ĉiuj diabloj, kvankam parte konfesante ŝian pravecon, sed nenion parolis. Tamen najbarino dedekstre pensis, ke la riproĉo konsideris ŝin – ŝi efektive ŝatis drinki – kaj la najbarino komencis krii al la maljunulino pli multe ardante:

– Ho, tio estas ne via afero! Ni drinkas je nia mono sed ne je la aliula! Kiam oni povas drinki se ne en libertago? – ŝi nemulte reakiris

spiron kaj ekvidinte interesiĝintajn rigardojn de vendistinoj daŭrigis dancante pro malvarmego kaj ekscitiĝo. – Dum ni estas junaj, ni volas ĝoji pro vivo! Ĉu tiel, knabinoj?

Viktoria pensis, ke ĝuste hieraŭ oni drinkis je aliula mono, sed tio estis ne grava. Ŝajnis, ke tuta bazaro pasie komencis disputon. Oni kriis kaj dedekstre kaj demaldekstre, kaj eĉ el aliaj vicoj aŭdiĝis krioj, kiuj pruvis, ke gajeco en Rusio estas drinkado¹.

Frostiĝintaj vendistinoj ekĝojis pro neatendita amuzo kaj komencis arde disputi. Ŝajnis, ke disputo varmigis ne nur animon sed ankaŭ frostiĝintajn korpojn.

Sed nur mem la kulpulino de disputo deiris al flanko por fumi petinte najbarinon observi varon. Nun ŝi staris en flanko de ĝenerala voĉbruo tute eksiginte konscion, rigardante ien super kapoj, kun aspekto de romantika enpensiĝemo. Krioj kaj disputoj eĥis per frapado en kapo, ŝi volis tutan senbruon, trankvilecon kaj varmon.

Al ŝi viro aliris kaj demandis ion. Viktoria profundiginta en sia sentado ne fiksaŭskultis tion, kion parolis la aĉetanto, kaj kutime diris:

– Bone!

La viro pli proksime moviĝis kaj komencis murmuri ion mallaŭte kaj insiste. Voĉo estis velura, afabla, ĝi vualis, varmigis kaj dormigis.

Viktoria de tempo al tempo jesis ne fiksaŭskultante vortojn. Fine orelo kaptis konatan frazon, kiun diris la aĉetanto:

– Ĉu ni interkonsentos?

Kaj ŝi kutime respondis:

– Bone, mi nemulte cedos, mi ne povas ne cedi al tiu afabla viro!

La aĉetanto ĝoje tuŝis ŝian manon kaj demandis rigardante ŝiajn okulojn:

– Mi proponas veni al mia aŭto. Jen ĝi staras, – li montris per mano aŭton kun

¹ “Gajeco en rusio estas drinkado” – estas citaĵo el fama antikva rusa kroniko.

